

# tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo  
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto septembro 1998



54-a Internacia Junulara Kongreso  
54. svjetski kongres mladih esperantista  
25 07 - 01 08 1998

SUKCESA  
KONGRESO DE  
KROATAJ  
ESPERANTISTOJ  
EN VARAŽDIN

OSIJEK INVITAS  
LA NOVAN  
KONGRESON  
POR LA JARO  
1999



IJK EN RIJEKA - LA SESDEKJARA JUBILEO DE TEJO

KROATIO GASTIGOS UNIVERSALAN KONGRESON DE  
ESPERANTO EN 2001

## Karaj legantoj,

### Zagreb - la kongresa urbo en la jaro 2001!

La aŭtunon de 1998 ni eniras kun grava decido de Universala Esperanto-Asocio: Zagreb en julio de la jaro 2001 gastigos Universalan Kongreson de Esperanto. La datoj de la zagreba kongreso estos de la 21a ĝis la 28a de julio 2001. La Kongresoj en la jaro 1999 okazos en Berlino kaj en la jaro 2000 en Tel Aviv.

La kroataj esperantistoj ricevis grandan taskon. La decido akcepti la kandidatigon de Kroatio prezentas grandan fidon al la kongresa lando, estimon al ĉio kio estis por Esperanto farita en Kroatio de ĉiuj generacioj de esperantistoj dum naŭ jardekoj de la organizita Esperanto-Movado en Kroatio.

Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb estas granda defio por ĉiuj nuntempaj esperantistoj en Kroatio. Mobiliziĝu!

Kiel vi persone povus kontribui por la sukceso de la granda internacia evento kiu al Kroatio alportos probable 3500 gastojn? (En la jaro 1953 kiam Zagreb gastigis UK ĉeestis 1760 kongresanoj).

Ni havas tempon por trankvile eniri organizadon de la laboro. Sed antaŭ ĉio, ĉiu el ni devas strebi plibonigi sian lingvoscion. La Kongreso helpu levi la prestiĝon de Esperanto en Kroatio en la Esperantaj kaj neesperantaj rondoj!

Ni estas bonŝancaj ĉar la aktuala konstanta kongresa sekretario estas zagrebano Nikola Rašić, kiu bone konas ne nur nian urbon sed ankaŭ la latentajn eblecojn de nia Movado - lia gvidado de la kongreso en la lando, kie li persone lernis la Esperantan metion certe havos aliajn akcentojn ol aliloke.

La urbaj kaj ŝtataj instancoj de Kroatio kun kontento akceptis la informon ke Zagreb estas elektita por la kongresurbo. Ni esperas, ke la urbaj oficejoj solvos ĝis tiam la problemojn de la ejoj por la esperantistoj de la urbo. La ministro pri kulturo Božo Biškupić akceptis la prezidanton kaj la sekretario de KEL, Dalibor Brozović kaj Spomenka Štimec kaj esprimis kontenton pri la aranĝo



Nikola Rašić kun ĵurnalistoj en Zagreb...



kaj kun turismaj oficistoj

en Zagreb.

La turismaj instancoj estis la plej afikaj: oni produktis novan eldonon de la zagreba prospekto en Esperanto ( pliaj mil ekzempleroj). Ankaŭ la bela afiŝo de la kongreso por la jaro 2001 estas presita en 1000 ekzempleroj! Ĝi havis sian lanĉon en Montpellier kaj baldaŭ estos oficiale prezenita en Zagreb.

La 54a Internacia Junulara Kongreso en Rijeka, okazinta en julio, envolvigis en organizan laboron multajn junajn homojn, kiuj sukcese organizis la grandan junularan aranĝon. La nomumo de Zagreb por la kongresa urbo de la jaro 2001 okazis en la ĉeesto de pluraj ĵurnalistoj en la Hotelo "Esplanade" la 13-an de majo 1998. Jam aperis kelkaj artikoloj pri la evento.

Ek al la komuna laboro por fiksi la lokon de Zagreb kiel gravan punkton en la bunta geografia mapo de la monda Esperantujo!



Universala  
Kongreso de Esperanto

Zagrebo - Kroatio

2001

S. Štimec

Propono de la kongresa simbolo

# Varaždin - la modela kongresurbo

Centkvindek esperantistoj el 26 lokoj el Kroatio kun gastoj el Hungario, Italio, Nederlando kaj Germanio renkontiĝis en la lasta tago de majo por la Dua kongreso de kroataj esperantistoj.

La gastiganto Esperanto-Societo "Božidar Vančik" faris modelan laboron. La urbo iam havis enviinde viglan Esperanto-vivon. Ĉi tie aktivis Božidar Vančik, la fama Esperanto-poeto, reprezentita en la *Esperanta Antologio*. Nuntempe la societo ne estas multnombra. Kiel ili sukcesis krei perfektajn kondiĉojn por la kongreso?

Jen superigardo el la vidpunkto de la kasistino Željka Ivić.

Sur la foto: Željka Ivić kaj Snježana Rusman: pretiĝis la Kongresa Libro!



## KIEL ORGANIZI BONAN NACIAN ESPERANTO-KONGRESON?

Post la Dua kongreso de kroataj esperantistoj en Varaždin LKK el Varaždin volonte listigas siajn konsilojn, esperante tiel helpi al la venontaj kongres-organizantoj... kaj ŝpari ilin nervojn:

- kontaktu la lokan kaj departamentajn instancojn kaj informu ke via urbo fariĝis la organizanto de la nacia kongreso
- al la sama instanco prezentu viajn financajn petojn por helpi en la laboro de la klubo organizi la kongreson
- klopodu de la samaj instancoj ricevi senpagan elegantan ejon por 120-150 kongresanoj. Kontrolu kiel funkcias mikrofonoj!
- kontaktu Turisman asocion de la urbo, montru prospektojn de aliaj urboj en Esperanto kaj petu ke tiu organizo siakoste presu por vi E-prospekton de la urbo
- preparu oficialan leteron kiun vi dissendos al aŭspicantoj por peti monan aŭ materialan helpon. Konsultu la liston de aŭspicantoj en la kongreslibro de la antaŭa jaro
- disendu la aliĝilojn por la kongreso kiujn produktis KEL
- informi la lokajn amaskomunikilojn pri la kongreso (radio, gazetoj, TV kaj preparu mem kelkajn artikolojn, radio kaj TV-elsendojn)
- invitu eksterlandanojn kun kiuj amikas viaj membroj kaj zorgu pri ilia loĝigo
- interkonsentu detalojn pri la kongresa programo kaj financoj kun KEL
- ekipu la ejon: akceptejon provizi per listo de partoprenantoj, laŭ la kongresnumero kaj grandformata programo de la



DANKVORTO DE LKK  
Ni dankas al ĉiuj partoprenantoj de La dua kongreso de kroataj esperantistoj

Sur la tombo de B. Vančik



- kongreso
- preparu specialajn dosierojn pri Esperanto por ĵurnalistoj
- akceptejon provizu per loko por KEL-kasisto
- koktelo laŭ eblecoj sed kafaaparato tre gravas
- prizorgu filatelian koverton de la Kongreso
- zorgu ke funkciu Libroservo kaj loka E-vendejeto
- zorgu pri la kongresa fotoservo
- zorgu pri la ornamo de la urbo kaj la salono (flagoj, banderoloj)
- muzika programo el via urbo (himnoj k.a.)
- ne forgesu ke vi bezonos nacilingvajn invitilojn por gastoj el la urbo kaj ĵurnalistoj
- dum la tuta tempo de la preparlaboroj vi bezonos komputilon kun E-literoj kaj lertajn komputistojn
- havu malmultkoston loĝejon por kongresanoj kiuj tranoktos antaŭ kaj post kongreso depende de la eblecoj de la organizanto
- ne lasu ĉion por lasta tago ĉar gastoj alvenas pli frue ol vi esperas

Ni eble ion forgesis, sed vi ne rajtus forgesi.

Željka Ivić

## AMUZA, NEKUTIMA, SUPRIZIGA, PUBLIKA, VARMEGA, TORTEGA IJK

*Dum la IJK povas okazi io ajn - citaĵo de Jomo*

La amuza, programplena, nekutima, surpriziga, publika, varmega, tortega... la 54a Internacia Junulara Kongreso estas for. Rijeka post ĝi restis kun belaj memoroj pri la kongreso. Ĝi estis nekutime malfermita al la publiko, kun ege granda subteno de la Urba Registaro kaj de amaskomunikiloj. Krom la organizantojn el Loka Kongresa Komitato, la Kongreso laborigis kelkdekon da reprezentantoj de la Urba Registaro, Turisma Komunumo kaj la Universitato de Rijeka. Ĉiuj ili sindediĉe helpadis, organize, ideo kaj finance. Pri la kongreso abundis intervjuoj en la gazetoj, radio kaj TV. Pri multaj problemoj ni povis trovi solvojn dank' al la subteno de diversaj instancoj en la urbo mem...

Pri la kvalito kaj sukceso de la Kongreso parolu partoprenantoj mem. Al mi estu permesate skizi mallongan superrigardon de la segmento de LKK, kiu nomiĝis Eksteraj Rilatoj.

La urbestro de Rijeka Slavko Linić, laŭ la propra iniciato parolis en Esperanto. Tiu fakto donis por la amaskomunikiloj plian gravecon al la Kongreso. La profesinivela malferma ceremonio impresis la kroatajn gastojn, interalie la altan protektanton de la kongreso, Katica Ivanišević, prezidantino de la Departamenta Ĉambro de la Kroata Ŝtata Parlamento. La partoprenantoj mem tamen ŝajnis esti pli impresitaj pri la bongustega supertorto, kiu estis farita speciale por la festo okaze de la 60-jariĝo de TEJO. Kiel la jubileo, ankaŭ la torto imponis per siaj dimensioj: la naskiĝtaga kuko ampleksis 1,80 x 2 metrojn!

Eĉ kvin partoprenantoj de la ĝemelur-

boj el Japanio, Italio kaj Hungario ricevis apartan surprizon - ili estis gastoj de la kongresa urbo kaj IJK - u m i s senpage!

Dum duonhora akcepto en la urbodomo ĉe la urbestro, en tre bela etoso, oni la unuan fojon parolis Esperanton en la oficialaj urbaj salonoj, kio ricevis grandan titolon en la gazeto *Novi list*.

Havi programplenan kongreson, kun riĉa kultura, tema kaj distra programoj kaj proponi la devigan 50% rabaton al B-landanoj ne signifas nepre produkti kapdoloron al la TEJO-estaro pro kreado de deficitego. Tion pruvigante sin dekomence serĉi kaj trovi diversajn aŭspiciantojn. Kvankam la ekonomia situacio en Kroatio ne estas senproblema, ni sukcesis de multaj flankoj ricevi la necesan helpon.

La LKK en Rijeka ĉi-jare strebis al kiel eble plej granda malfermite-

co de la IJK al la ekstera publiko, produktante bruon pri la Kongreso antaŭ, dum kaj post ĝi. Rezultoj ne mankis, kaj ni elkore konsilas al ĉiuj ontaj organizantoj: maksimume malfermu la kongreson al la urbaj kaj ŝtataj instancoj, petu ĝustatempe subtenon. Tiu ĉi recepto sanigas duoble: oni kreas pli bonan financan bazon kaj samtempe la Internacia Lingvo ricevas tion kion ĝi meritas: la agnoskon de tiuj, kiuj ne parolas Esperanton.

La 54a IJK en Rijeka estas for! Vivu la 55a en Zanka, Hungario!

*Sanja Bokulić, (eks)prezidanto de LKK*



### IJK TV ESPERANTISTOJ KAPABLAS FARI TELEVIDAN PROGRAMON



Raraĵoj en Kroatio iĝas jam tradiciaj. Post la IJK en Zagreb en 1988 denove iu Esperanto-kongreso havis propran televidon. Kvin filmistoj - teknikistoj, unu intervjuisto, multaj kunlaborantoj, tri kameraoj, unu SVHS multilo, multaj konektiloj kaj kilometroj da drato rezultis per ses 20 - 30 minutaj elsendoj.


Tre sprita kaj spektiinda programo gajnis multajn laŭdojn dum la kongreso mem, kvankam ne ĉiam taŭgis la ejoj kie oni prezentis la programon.

La kvaliton de la elsendoj garantiis freŝaj ideoj kaj lerteco de la TV-teamo (en kiu estis unu profesia TV-kameraisto), kaj kunlaboro de multaj kongresanoj.

#### MENDU LA KASEDON!

Ĉe KEJA, Amruševa 5, HR-10000 Zagreb  
Tel:+385/1/4810152, fax:+385/1/4817067 oni povas mendi duhoran VHS kasedon kun kompilo de la tuta programo de la IJK-TV.  
Prezo 53 GM + sendokostoj





Dum la preparado de IJK en Zagreb



Klaŭnoj el unu laborgrupo pozas antaŭ ol disiri al multaj anguloj de la mondo


## Kvar novaj libroj en Esperanto el Kroatio



*La Kamaradaro de Petro Nodeto* apartenas al la klasikaj verkoj de porinfana literaturo en Kroatio. Kamaradaro de Petro Nodeto estis tradukita de Josip Pleadin, kiu financis la eldonon kadre de eldonagado de Matica Hrvatska Đurdevac. Prezo 67 KN

*En tiu terura momento* estas Antologio de la milita liriko el Kroatio, kiun ni prezentas sur la paĝo ok per la enkonduko de prezidanto de KEL Dalibor Brozović.

Prezo 50 KN



*Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić* estis tradukitaj de Maja Tišljar kaj eldonis la verkon, kun la helpo de Kroata kulturministerio Kroata Esperanto-Ligo.

Prezo 50 KN

*La D-ro Senesperanto serĉas la bonan etoson* estas jam la tria bildstrio kiun originale en Esperanto verkis Arnau Torras. Tiun tre gajan albumon kiu en detektiveca etoso okupiĝas pri E-movado kaj E-literaturo eldonis la firmao Libro TIM el Zagreb.

Prezo 8 DM



Preskaŭ 30 kroataj esperantistoj reprezentis Kroation ĉe la 83a Universala Kongreso de Esperanto en Montpellier. La kontribuo de la kroatoj al la kongreso estis rimarkinda.

Zagreb havis sian giĉeton apud la giĉetoj de Berlin kaj Tel Aviv. En nia giĉeto, kiun financis Turisma Komunumo de la urbo Zagreb riceveblis la nova afiŝo pri la Uni-

versala Kongreso de Esperanto en la jaro 2001. Pluraj membroj de Kroata Esperanto-Ligo fidele deĵoris kaj distribuis informojn, la mielkukojn de Zagreb, la novan urboprospekton de Zagreb kaj de Varaždín. Tie la estontaj partoprenantoj povis konatiĝi kun la kroata Esperanta poŝtmarko kaj la Esperanta monero, per kiu ili en 2001 povos pagi siajn servojn.

Vida Jerman kontribuis al la kultura programo de la franca kongreso per sukcesa nova teatraĵo dediĉita al la temo - virino. Okaze de la kongreso en Francio ŝi surscenigis premiere la dramon de la konata franca verkistino Simone de Beauvoir *La rompita virino*. Por la kongreso Vida Jerman produktis belan faldfolion okaze de la 25jara laboro por la Esperanta teatro. Ni gratulas okaze de la unika jubileo en la kroata teatra laboro.

David Rey-Hudeček reprezentis la kroatajn infanojn parolantaj Esperanton ĉe la Infana Kongreseto en Sommier. Li tie prezentis por siaj geamikoj la novan porinfanan libron el Kroatio *Mirindaj aventuroj de metilernato Hlapiĉ*.

S p o m e n k a Ŝtimec aktivis en la komitato de UEA, Akademio de Esperanto kaj Esperantlingva Verkista Asocio - EVA, kiu en Francio festis dekkvin jarojn de sia ekzisto, lanĉinte William Auld por la kandidatigo por la Nobelpremio pri literaturo. Ŝi zorgis kun Viŝnja Branković pri la aŭtobusa karavano, kiu kunligis la du kongresajn urbojn Rijeka kaj Montpellier kaj gvidis internacian artan vesperon.

Zlatko Lončarić kontribuis al la populareco de la kroata budo en la kongresejo per atentotira popola kostumo el Slavonio per kiu li varbis por la Kongreso en 2001.

Multaj kroataj kongresanoj partoprenis en diversaj laborgrupoj de la kongreso. Kun plej multe da emocioj travivis la kongreson la unuafaj kongresanoj.

S. Ŝtimec

# UNIVERSALA KONGRESO

## Montpellier - Francio



versala Kongreso de Esperanto en la jaro 2001. Pluraj membroj de Kroata Esperanto-Ligo fidele deĵoris kaj distribuis informojn, la mielkukojn de Zagreb, la novan urboprospekton de Zagreb kaj de Varaždín. Tie la estontaj partoprenantoj povis konatiĝi kun la kroata Esperanta poŝtmarko kaj la Esperanta monero, per kiu ili en 2001 povos pagi siajn servojn.

Vida Jerman kontribuis al la kultura programo de la franca kongreso per sukcesa nova teatraĵo dediĉita al la temo - virino. Okaze de la kongreso en Francio ŝi surscenigis premiere la dramon de la konata franca verkistino Simone de Beauvoir *La rompita virino*. Por la kongreso Vida Jerman produktis belan faldfolion okaze de la 25jara laboro por la Esperanta teatro. Ni gratulas okaze de la unika jubileo en la kroata teatra laboro.

David Rey-Hudeček reprezentis la kroatajn infanojn parolantaj Esperanton ĉe la Infana Kongreseto en Sommier. Li tie prezentis por siaj geamikoj la novan porinfanan libron el Kroatio *Mirindaj aventuroj de metilernato Hlapiĉ*.

S p o m e n k a Ŝtimec aktivis en la komitato de UEA, Akademio de Esperanto kaj Esperantlingva Verkista Asocio - EVA, kiu en Francio festis dekkvin jarojn de sia ekzisto, lanĉinte William Auld por la kandidatigo por la Nobelpremio pri literaturo. Ŝi zorgis kun Viŝnja Branković pri la aŭtobusa karavano, kiu kunligis la du kongresajn urbojn Rijeka kaj Montpellier kaj gvidis internacian artan vesperon.

Zlatko Lončarić kontribuis al la populareco de la kroata budo en la kongresejo per atentotira popola kostumo el Slavonio per kiu li varbis por la Kongreso en 2001.

Multaj kroataj kongresanoj partoprenis en diversaj laborgrupoj de la kongreso. Kun plej multe da emocioj travivis la kongreson la unuafaj kongresanoj.

S. Ŝtimec



La giĉeto de Zagreb kun zagrebaj esperantistoj



La kroata karavano inter Rijeka kaj Montpellier



Kiel informi pri Kroatio?

En Montpellier Universala Esperanto-Asocio ricevis novan estraron. La prezidanto de UEA estas Keppel E. Enderby el Aŭstralio (sur la foto). Elkorajn bondezirojn al la nova estraro! Kroatio havos honoron gastigi ĝin en Zagreb en 2001.



Berlin - gastiganto de UK en 1999

## LA UNUA UK DE LA KONGRESNUMERO 2456

**H**odiaŭ kiel en la tempo kiam mi estis lernantino kaj studentino, mi ĉiam ĝojas pri somero. Laboro estas farita kaj oni meritas ripozi. Monatoj de ĝojo, amuzo, senzorgo. Monatoj de la suno, varmeĉo, ĝuo.

Sed tiu ĉi somero de 1998 devus esti io speciala. Mi, esperantistino kun juna koro kaj modesta internacia sperto, partoprenis mian unuan UK en Montpeliero.

Tiom da aĵoj por pripensi, organizi, fari. Vestaĵoj! Pasporto! Mono! Mi eĉ ne havis tempon por pensi pri la kongreso. Mi laboris ĝis la momento de la foriro.

Iomete laca, mi komencis la vojaĝadon. Zagreb-Rijeka-Trieste. Slovenio - Italio- Francio. Oni apenaŭ povis orienti sin kie oni estas. Horo post horo, pasis tempo, nokto-tago-nokto. Post la 22-hora vojaĝado, la multnacia aŭtobuso el Kroatio atingis Montpelieron. Sed tio ne estis la fino de la veturado. Oni devis trovi loĝejon. Tio vere estis tre malfacila tasko. Ni cirkulis tra stratoj kaj stratetoj de Montpeliero. Tiam mi memoris la verson de la popola kanto:

Kie, diable, estas domo mia?

Strato, strato, estas vi ebria!

Estis post la noktomezo kiam ni enlitiĝis. Morgaŭ estos la grava tago.

Dimanĉon, la 2-an de aŭgusto, mi ellitiĝis frumatene kaj zorgeme preparis min por mia unua solena inaŭguro de UK. Eĉ pluvo ne povis malbonigi emocion kaj humoron.

Nur kiam mi alvenis en la kongresejon, mi komprenis kiel grandega estas tiu ĉi okazaĵo. Tiom da homoj el la tuta mondo! Ĉiuj tiel diversaj, altaj - malaltaj, dikaj - maldikaj, blankaj - nigraj - flavaj. Junuloj, knabinoj, fraŭloj! Patroj, patrinoj, geavoj, gefiloj! Verkistoj, poŝtistoj, ju-



ristoj, muzikistoj, fervojistoj, instruistoj, kantistoj, lernantoj... sed ĉiuj kontentaj kaj gajaj ĉar ili estas ĉi tie, en Montpeliero, en la 83a UK.

Kaj ĉiu homo - unu malgranda kosmo. Ĉu vi povas imagi kiom da steloj brilis en tiu agrabla, gastama suda franca urbeto dum unu semajno? Per tiu ĉi lumo oni povus lumigi amojn de la tuta homaro. Bedaŭrinde, la granda parto de tiu ĉi homaro estas blinda por la lumo kiun portas ni, la bravaj homoj de la morgaŭo.

Ne gravas, ke nun ni ne povas malfermi la okulojn de ĉiuj animblinduloj. Unu post unu, dek post dek, cent post cent... ĉiam oni devas penadi.

Ion mi certe scias! Esperanto estas grava kaj serioza afero. Esperanto ne estas rimedo por "eviti enuon". Mi bedaŭtras la homojn, kiuj ne komprenas tion, kies okuloj kaj koroj restas fermitaj.

Mi ne povas trovi la vortojn por esprimi sentojn kiuj plenigis mian koron en Montpeliero. Ŝajnas ke mi revenis hejmen kun la milkilograma koro, sed tamen tiom malpeza, vigla, ke mi povus flugi, ke mi povus ŝanĝi la mondon.

Tiu ĉi 83-a UK ne estis tio kion mi imagis. Tiu kongreso estis multe, multe pli. Dum unu semajno mi vere estis la civitano de la mondo. La mondo senzorga, sen militoj, sen malamikeco, sen malsano, sen envio.

*Melanija Grgić, Kongresnumero 2456*

## KIAL ELDONI MILITAN LIRIKON EN ESPERANTO?

OKAZE DE ANTOLOGIO DE LA NUNTEMPA  
KROATA MILITA LIRIKO

La poezio kiu en tiu ĉi antologio estas proponita al la Esperanta legantaro sufiĉe diferencas de la granda parto da tekstoj, kiuj al tia publiko estas je la dispono. Se ekzistas en la homaro almenaŭ unu senkondiĉe pacama grupo da homoj, tiam esperantistoj nepre estas la unuaj kandidatoj por tiu honoro. Kaj nun ni havas en niaj manoj antologion de la primilita poezio, la antologion de la nuntempa kroata milita liriko en la Esperanta traduko. Sed ni ne tuj rapidpense juĝu, ni ne tuj konkludu ke la kroatoj estas militema popolo. Ili ne estas. La kroata regno kiu estis sendependa ĝis la komenco de la 12a jarcento militis nur du fojojn, en ambaŭ kazoj por sin defendi. Unu fojon kontraŭ hungaroj, kiuj komencis alpremi la regnon el la direkto de la nordo. La duan fojon kontraŭ bulgaroj, kiam ili aperis en la orienta landlimo, konkerinte Serbion. (Tiu tempe la kroata regno donis protekton al la serba duko Zaharija.) Komence de la 12a jarcento Kroatio eniris en unuiĝon kun la hungara regno, ligita per la personeco de la reĝo. Kroatio retenis vastan aŭtonomecon kun la propraj armeo kaj parlamento. La kroata parlamento fondiĝinta en la 9a jarcento de post la 13a jarcento funkciis kiel unu el la plej malnovaj eŭropaj parlamentoj. La aŭtonomeco de Kroatio estis nuligita nur en la jaro 1918 kiam Kroatio troviĝis kun la plimulto de sudslavaj popoloj en la komuna ŝtato. De post la jaro 1929 la ŝtato nomiĝis Jugoslavio. Tiu nomo estis falsa, ĉar Jugo-slavio signifis "la lando de la sudaj slavo", sed bulgaroj en ĝi ne partoprenis.

En la kroata-hungara unuiĝo kaj post la jaro 1526 en la aŭstro-hungara unuiĝo, la kroata armeo partoprenis en la militoj gviditaj de fremdaj dinastioj, unue de la hungaraj kaj poste de la aŭstra, sed sur sia propra teritorio kaj je siaj landlimoj, ĝi partoprenis nur en la defendado. En la 13a jarcento la mongol-tatara atako fiaskis ĝuste en Kroatio post kiam ĝi konkeris la duonon de Eŭropo. De post la 15a ĝis la 17a jarcento sur la kroata teritorio estis haltigitaj turkoj post kiam ili konkeris la tutan sudorienton de la eŭropa kontinento de Greklando ĝis Serbio kaj Rumanio. Trans Kroatio la turkaj konkerintoj ne transiris pluen al la Okcidento.

En sia historio kroatoj do multe kaj ofte militis, sed mem nek komencis la militojn nek klopodis konkeri alies landoj. Tio estas ĝenerale konataj kaj la ĝenerale rekonitaj faktoj kaj ne la kutima pacdemagogio uzita ofte eĉ de agresintoj. Sekve, la kialo ke kroatoj havas modernan antologion de la milita antologio ne estas pro tio ke kroatoj estas militavida, militema popolo, sed pro tio, ke en la jaro 1991-1994 al kroatoj estis altrudita terura milito en kiu ili ne nur defendis sian landon sed laŭvorte ankaŭ sian ekziston. Tiu milito profunde enradikiĝis en la ĝeneralan konscion de la kroata popolo kaj nature ĝi ankaŭ trovis sian respegulon en la kroata poezia verkado. Antologiistoj Ivo Sanader kaj Ante Stamaĉ nur kolektis la versojn disemitaĵojn en diversaj revuoj kaj librokolektoj.

La milito de 1991 ĝis 1994 kiun kroatoj nomas *la patrolanda milito* estis vere terura. Pluraj centmiloj da homoj estis forpelitaj el siaj hejmoj aŭ ili mem rifuĝis de la okupita teritorio. Sisteme estis forbruligitaj aŭ ruinigitaj domoj kaj precipe preĝejoj, detruitaj tombejoj, forbruligitaj bibliotekoj, hospitaloj trafitaĵoj per grenadoj. La martira urbo Vukovar, belega monumento de la ĉirkaŭdanuba arkitekturo kaj civilizo, estis komplete detruita en la aŭtuno 1991 kaj ĝi restis preskaŭ kvar jarojn okupita. La urbo Dubrovnik, la plej bela perlo de la mediteranea civilizo, estis sisteme grenadita je la konsterniĝo de la tuta kultura mondo. Multaj homoj estis murditaj, nuntempe oni elfosas terurajn amastombejojn. En Kroatio preskaŭ ĉiu perdis iun familianon en la milito.\* Ĉio ĉi respeguliĝas en la antologio kaj ne estas strange ke en ĝi troviĝas ankaŭ kelkaj drastaj versoj ĉar ĝia instigo estis pli ol terura. Pli grave estas, ke tiu antologio estu la dokumento de la militaj teruraĵoj, ke ĝi almenaŭ parte efiku kiel atentigo kaj admono por la estonteco. Tio estas ĝia profunda, vera senco.

En tiu poemaro estis reprezentitaj 62 poetoj, la plej multaj nur per unu poemo, kelkaj per du, tri per tri kaj unu eĉ per kvar poemoj. Entute enestas 85 poemoj. Unu el la reprezentitaj poetoj (Jevrem Brković) fakte partoprenas al la montenegra literaturo sed ĉar la elstara montenegra poeto pro la partopreno de

la montenegraj taĉmentoj en la agreso kontraŭ Kroatio kaj Bosnio kaj Hercegovino elmigris en Kroation kaj poezie reagis en Kroatio, lia poemo malrekte apartenas ankaŭ al la kroata liriko. Du poetoj verkis dialekte: Blanka Dvojčak-Matković verkis kajkave kaj Marija Trinaestić ĉakave. Verki dialekte apartenas al specifa tradicio de la kroata poezio.

La poetoj reprezentitaj en la antologio estas tre variaj. Inter ili troviĝas komencantoj sed ankaŭ la plej elstaraj poetoj de la kroata poezio (Tadijanović, Mihalić kaj Miličević estas la membroj de la Literatura sekcio en la Kroata akademio de scienco kaj arto.) Iuj estas profesiaj aŭ duonprofesiaj verkistoj. La aliajn la militaj teruroj pelis al verkado. Vastas la aĝo de la aŭtoroj: la naskiĝjaroj ampleksas la tempon inter 1905 kaj 1970. Tiu ĉi antologio havas sian specifan karakterizaĵon - kiel la enkonduka teksto, antaŭ la antaŭparoloj, estis presita karakteriza poemo de Augustin Tin Ujević (1891-1955), klasikulo de la kroata poezio. Tiuj versoj, rilatantaj al iu alia epoko, prezentas impresodnan kaj ne nur teman enkondukon al la poemaro.


La Esperanta eldono plej parte kongruas kun la kroata eldono el la jaro 1994, sed ĝi estas pliriĉigita per la informoj pri la tradukintoj. Krome ĝi estis pliriĉigita per du poetoj kiujn la antologiistoj enkondukis en la aliajn eldonojn, publikigitaj post la kroata eldono. Tiel Irena Vrkljan aperis en la pola kaj la germana eldonoj kaj Tonko Maroević en la itala. En la antologio en Esperanto troviĝas du novaj poemoj de jam reprezentitaj aŭtoroj (tial la indikitaj ciferoj ne kongruas kun la cititaj). Estus maljuste se el tiu ĉi eldono forestus la origina voĉo de la Esperanta poezio. La kroataj poetoj verkantaj en Esperanto ne surdis pri la defioj de la militaj teruroj. La pruvo pri tio estas la poemo de D-ro Ivo Borovečki, elstara poeto de la Esperanta originala poezio kaj tradukinto en Esperanton. Lia poemo estis verkita en la plej bona poezia tradicio de *Rimportretoj* de Kalocsay kaj ĝi estis dediĉita al du grandaj reprezentantoj de la Esperanta muzo William Auld kaj Albert Goodheir.

La antologio En tiu terura momento havis nekutiman sukceson en la monda literatura dimensio. Ĝis nun aperis 18 tradukoj de la verko. La Esperanta traduko estas la 19a eldono de la verko. Mi citos la verkojn laŭ la lingvaj grupoj: la slovena, makedona, bulgara, slovakaj, pola, ukraina, rusa, germana, franca, hispana, itala, rumana, albana, hungara, turka, araba, japana kaj ĉina. Nun estas preparataj la angla kaj la korea eldonoj, baldaŭ eldonotoj, kio sumas la tradukojn ĝis nun al 21 lingvoj. Tradukoj al kelkaj aliaj lingvoj estas preparataj. Nia Esperanta traduko troviĝas do en bona societo. Ni deziras al ĝi la feliĉan vojaĝon renkonte al la Esperanta publiko en ĉiuj anguloj de la mondo.

Kaj laste, jen nia peto. La kroatajn esperantistojn kiuj tiun ĉi eldonon prezentis la unuan fojon dum la Dua kongreso de kroataj esperantistoj en la urbo Varaždin la 31-an de majo 1998, interesas la sorto de tiu ĉi libro. Se ie ajn en la mondo, en kiu ajn lingvo aperos recenzo pri la antologio aŭ se aperus traduko de iu el la poemoj al iu lingvo, ni elkore petas, bonvolu sendi al ni eltranĉaĵon aŭ kopion.

\*Ankaŭ la kroata Esperanta movado perdis plurajn siajn membrojn

D-ro Dalibor Brozović



## SINJ

La urbo Sinj estis dum la julia kunsido de la prezidantaro de KEL elektita por la kongresa urbo de la kroataj esperantistoj en la jaro 2000. La Societo por Esperanto *Dinko Šimunović* konkurencis kontraŭ la urbo Đurđevac por la kongresurbo en la jaro 2000 kaj Sinj ricevis la kongreson sub du kondiĉoj: ke oni ĝis la jaro 2000 levu la lingvan kapablon de siaj membroj kaj ke oni ligu la kongreson al la historie kaj turisme plej prestiĝa evento de Sinj - la fama ringludo *alka*. Tiu ĉevalludo portis per Esperanto la famon pri Sinj ĝis Ĉinio per la verko *Ano de l' ringludo* de la aŭtoro Dinko Šimunović. La societo portas la nomon de la verkisto.




## HRVATSKA KOSTAJNICA

Al Hrvatska Kostajnica iris la unua premio de la enigma revuo *Feniks* el Rijeka por solvoj de la taskoj de Esperanto-lernejo.

La premion kaj la septagan restadon ĉe IJK en Rijeka gajnis Vladimir Dujnić (Ratka Djetelića 65, 44430 Hrv. Kostajnica.) Vladimir estas nuntempe la sola esperantisto en Kostajnica kaj li post IJK diligente lernas Esperanton. En Kostajnica estis komence de la jarcento publikigita unu el la unuaj tradukoj el la kroata en Esperanton *La konfeso* de Milka Pogačić, tradukis Antonija Jozić

## LA PINTO DE DINARA

Zlatko Lončarić, prezidanto de la Esperanto-Klubo *Liberiga Stelo* el Osijek grimpis ĉi-somere al la monto Dinara. Kun li atingis la montopinton la verda flago. Ĉu la Esperanta flago flirtis ie en Kroatio pli alte ol ĉe la 1831a metro?



## SLAVONSKI BROD



Ivan Stojanić, esperantisto el Slavonki Brod, okaze de la Dua kongreso de kroataj esperantistoj en Varaždin en majo organizis per Kroata Filatelia Societo el Slavonki Brod imponan ekspozicion pri la temo Esperanto


en filatelio. La riĉa kolekto de filatelaĵoj de Ivan Stojanić helpas flegi ideon pri Esperanto en Slavonki Brod, kie nuntempe ne plu funkcias Esperanto-Societo kaj kie ekde la jaro 1932 estis eldonata la grava Movada kultura revuo *La Suda Stelo*.

## ĐURĐEVAC

Đurđevac akcentas la kulturen valoron de Esperanto. Zdravko Seleš, prezidanto de Matica Hrvatska Đurđevac kaj konata kroata literaturema esperantisto kontribuis por la revuo *Hrvatski sjever* (Kroata Nordo) per la traduko el Esperanto. Por la volumo 1/2 de la jaro 1998 de la revuo li tradukis *Onklon Ruben* de Selma Lagorlöf.

Zdravko Seleš, nuntempe instruas la kroatan lingvon en la mezlernejo en Đurđevac. Li kroatis la faman lernilon pri la Esperanta literaturo de Marjorie Boulton *Ne nur leteroj de plumamikoj, Esperanto-Literaturo - Unika fenomeno*. (La libro, publikigita en Zagreb en 1988 daŭre estas havebla en la kroata ĉe KEL). La dulingva poemaro de Zdravko Seleš *Noćnik - Noktulo* kroata-esperanta pro la milito ne estis sufiĉe konata.

Lastatempe el Đurđevac foriris en la mondon la fama infana libro de Mato Lovrak *Kamaradaro de Petro Nodeto*, tradukita Esperanten kaj financita de Josip Pleadin.



Zdravko Seleš

**NOCNIK - NOKTULO**

## PULA

D-ro Ivo Borovečki gastis en aprilo ĉe la Istria TV-NOVA kaj du fojojn prezentis siajn tradukojn el la originala Esperanta poezio. Interalie li prezentis en la kroata la poemon de William Auld, kiu post aŭgusto 1998 fariĝis kandidato por la Nobelpremio pro la impona verkado en Esperanto.

Borovečki estis unu el la prelegantoj de IJK en Rijeka, kie li prezentis la historion de la kroata lingvo kaj interalie renkontis sian junan amikon Domagoj Vidović el Metković. Domagoj Vidović, juna studento pri lingvistiko, estas la plej bona konanto de la malnova kroata skribo glagolico en Kroatio kaj D-ro Borovečki instigis sian junan plumamikon okupiĝi pri Esperanto.

## Premiitaj junuloj el Osijek, Metković kaj Split

Okaze de IJK en Rijeka la urbaj edukaj instancoj el Osijek, Split kaj Metković premiis tri junulojn per senpaga partopreno en la Internacia Junulara Kongreso en Rijeka. Tiuj estis Hrvoje Sandukčić el Osijek, Domagoj Vidović el Metković kaj Željana Marić el Split.

## EL ĈINIO

De la ĉina peranto de IKEF, Internacia Komerca Esperanto-Fako, Cielismo Von alvenis interesa komento pri Kroatio. Ni citas "Por ni, ĉinaj esperantistoj, Kroatio estas unu el sanktaj lokoj de nia lingvo Esperanto. Mi estime salutas al vi kaj aliaj gesamideanoj en Kroatio, kiuj faris grandan kontribuon por konstrui la spiritan civilizon de Esperanto en la pasinta tempo. Nun ni kune konstruu la materian civilizon de Esperanto en la moderna epoko!"

## OSIJEK

La 3a kongreso de la kroataj esperantistoj okazos en Osijek dum la 30a kaj la 31a de majo 1999. La esperantistoj en Osijek dum la dutaga kongreso proponas al la kongresanoj ankaŭ ekskurson al Đakovo kaj Vukovar.

### Tempo

Jaro XVII, numero 2/98  
Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo  
Aperas laŭeble kvar foje jare  
Eldonas Kroata Esperanto-Ligo  
ISSN 0352-1583

### Redakcio:


Amruševa 5,  
HR-10000 Zagreb  
Tel: +(385 1) 4810152  
Fakso: +(385 1)4817067  
Rete: [esperanto@zg.tel.hr](mailto:esperanto@zg.tel.hr)

Kontribuis: Sanja Bokulić, Dalibor Brozović, Melanija Grgić, Tomi Haramina, Željka Ivić, Zlatko Lončarić, Vjekoslav Morankić, Ivan Stojanić, Spomenka Štimec

Lingve kontrolis: Lucija Borčić

## ORBIS PICTUS

Orbis Pictus, la Esperanta Firmao de Višnja Branković prizorgis Libroservon en Varaždin kaj Rijeka, kunorganizis karavanon de kroataj esperantistoj al Montpellier kaj organizis la 5-ajn Somerajn kursojn en Istrio.



## Atestiloj en "Bude Borjan"

La somero komenciĝis en "Bude Borjan" per multaj gratuloj al la A, B kaj C-kursanoj, kiuj ricevis atestilojn post la fino de la kursoj gviditaj de Vera Repac Roknić kaj Spomenka Štimec. Ses gimnazianoj el A kaj B-kursoj en julio partoprenis en IJK en Rijeka dum du C-kursoj spertis la internacian Esperantan etoson aŭguste en Francio.



Kompostis kaj presis: Libro-TIM.

### Anonc-tarifo:

1/1 paĝo 800 kn, 1/2 paĝo 400 kn, 1/3 paĝo 200 kn, 1/8 paĝo 100 kn. Eta anonco 50 kn. (Kovrilpaĝo duoble).

### Abono:

4 numeroj jare 35 kn (10 DEM)  
unuopa numero 10 kn (3 DEM)  
Bv. aldoni sendokostojn.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj en la suskribitaj tekstoj.  
Redakcija ne odgvara za mišljenja iznesena u potpisanim člancima.

## WILLIAM AULD- KANDIDATO POR LA NOBELPREMIO PRI LITERATURO 1999

**D**um la Universala Kongreso en Montpellier kadre de la jarkunveno de Esperantlingva Verkista Asocio - EVA William Auld, unu el la plej prestiĝaj Esperanto-verkistoj estis proponita por kandidato por la Nobelpremio. Tiu valora iniciato de la verkisto Manuel de Seabra celas atentigi la Nobelpremiajn instancojn pri la verkado en Esperanto kaj helpi al esperantistoj konscii pri la valoro de sia propra literaturo. La kandidatigon al la Sveda Akademio kune proponos tri kulturaj Esperanto- instancoj, krom EVA ankaŭ Internacia Esperanto-Muzeo el Vieno kaj Esperanta PEN el Svislando.

William Auld en Kroatio havas multajn estimantojn. Per lia fama lernolibro *Paŝoj al plena posedo* lingve perfektigis pluraj kroataj esperantistoj. Plej konata kiel la aŭtoro de la plej digna Esperanta poezia verko *La infana raso*, Auld kreis por ni la *Esperantan Antologion*, kiu fundamente

dokumentas pri la potenco de la Esperanta poezio. Poeto, antologisto, kaj redaktoro Auld estas unu el la plej fundaj Movadaj eseistoj kaj nesupurebla tradukisto, ĉefe el la angla, skota sed ankaŭ el la persa literaturoj.

Estas tute etaj la ŝancoj ke verkisto kiu verkas en Esperanto ricevu la Nobel- premion en 1999. Ni ĉiuj konscias, ke la premio ne estas atribuata nur pro literaturaj kialoj. Sed ni ĝoju ke ni jen, havas kandidataton por la Nobelpremio pri literaturo por la jaro 1999. La nura nomumo por la premio helpu al esperantistoj elkreski el la literatura "la infana raso". Ĝi estas samtempe omaĝo al ĉiuj kiuj verkis en Esperanto kaj kiuj, kiel tion diras Auld en *Dediĉo en Esperanta Antologio*.

*Kiam adoro venos al via kor jubili,  
memoru ĉi parulojn. Adoris ankaŭ ili.*

### *Mia filino trijara* 1958

Betulo korte kisas nubojn,  
aŭroras froste kristalbril',  
kaj ŝiajn blondajn harojn vento  
ŝaumigas. Mildo kaj trankvil'.

Kiel karigo apudlaga  
ŝi klinas sin penseme: ran'  
pulsante, pene, saltmeditas,  
sub la scivol de ŝia man',

dum kverelas ŝia kor' kuraĝe  
sub diafano de l' skrupul'  
kaj lante tra l' matenaj herboj  
aldrivas flokoj de nebul'.



### *Moja troyodiŝnja kći* 1958.

Na dvoru breza oblak ljubi,  
dok zore hladne bljeŝti sjaj,  
a njene plave kose vjetar  
sad mrsi. Ljupkost tiha znaj.

Ko ŝaŝ kraj nekog jezerca  
saginje se, a ŝabac joj  
ŝto diŝe teŝko, na skok spreman,  
sad stoji na ruci toj.

Dok guĉe njeno hrabro srce,  
bestraga nesta sumnje jad,  
polako veĉ kroz trave jutra  
pahulje magle stiŝu sad.

*Tradukis: Ivo Boroveĉki*

### *Korespondantino*

Precipe, se la pluvo el gargojlo  
al akvavida tero bruske falas,  
pri ŝi mi pensas, kiu min regalas  
per dolĉaj vortoj el lontana sojlo,


kiu eterne fermos sin al hojlo  
sufera de l' pasio; ridoj knalas  
en la letero, fajras kaj kristalas:  
memoras ŝin deliro kaj orgojlo...

La kara lingvo vervas amfervore,  
en longa kiso, kiun mi de fore  
el skribo seka al ŝiaj lipoj premas.

Mi legas ŝin kaj mi plezuras ame,  
kaj mi fiere kredas, ke ŝi same  
mian leteron kaptas kaj  
ektremas!...

## Geraldo Mattos, Prezidanto de Akademio de Esperanto

Universitata profesoro Gerlado Mattos el Brazilo (1931) estis elektita por la prezidanto de Akademio de Esperanto. Doktoro pri la portugala lingvo kaj gramatikisto li ankaŭ estas konata esperanta verkisto. Li loĝas en Kuritibo.



G. Mattos kaj S. Ŝtimec dum UK en Francio

*Tempo* gratulas okaze de lia nova posteno de la akademia prezidanto kaj prezentas lin kiel poeton el lia frutempa kaj



DUA KONGRESO  
DE KROATAJ ESPERANTISTOJ

**Varaždin**

31. 5. 1998.



# VARAŽDIN - NIA KONGRESURBO - KANDIDATO POR UNESCO-URBO

